


francaj krucistoj, verŝajne je la komenco de la XIII-a jarcento. Sed ŝajnas al la historiistoj kaj arkeologoj, ke la deveno de la « Lanternoj de la Mortintoj » estas franca, ne nur ĉar la plej multaj staras en Francujo, sed ankaŭ tial, ke en la aliaj landoj oni konstruis ilin dum la XIV-a, XV-a, eĉ XVI-a jarcentoj, do multe pli malfrue ol en Francujo. Pro tio ni povas opinii, ke en aliaj landoj oni nur kopiis la francan kutimon starigi tiajn lumturojn en la tombejoj.

Ne en ĉiuj regionoj de Francujo konstruiĝis la « Lanternoj de la Mortintoj », sed en la centra kaj okcidenta partoj de la lando. Nur tri el ili troviĝas en aliaj francaj regionoj : du en Normandio, unu en Provenco, ... kaj oni ne estas certa, ke tiuj tri konstruaĵoj estas veraj « lanternoj ». Tia fakto multe pri-



- - Lanternoj hodiaŭ ekzistantaj.
- - Lanternoj nun detruitaj aŭ ruinigitaj.
- ▲ - Dubaj lanternoj ekzistantaj.
- △ - Dubaj lanternoj nun detruitaj.

pensigis la arkeologojn, kiuj proponis plurajn klarigajn hipotezojn. Ĉar oni trovas tiajn malgrandajn lumturojn precipe en la lokoj, kie staris benediktaj abatejoj, — same en aliaj landoj, kiel en Francujo — multaj kleruloj nun opinias, ke ni ŝvidas la « Lan-

ternojn de la Mortintoj » al la Benediktanoj, en kies ĉefa abatejo (Abatejo de Cluny) vere naskiĝis la kulto por la mortintoj, kun specialaj ceremonioj la 2-an de novembro ĉiujare.

Estas klare, ke la ĉefa celo de tiuj malgrandaj lumturoj estis omaĝi al la mortintoj. Ĉie, ĉiam, en ĉiuj religioj, oni honoris la mortintojn, lumigante lampojn, kandelojn aŭ flamon jen sur la doma altaro en la antikva Romo, jen sur la tomboj de kelkaj regionoj kaj landoj dum la nokto de la 1-a ĝis la 2-a de novembro, jen apud la kadavro aŭ la ĉerko antaŭ la entombigo, jen, nuntempe, sur la tombo de la « Nekonata Soldato » en diversaj landoj. Ankaŭ la « Lanternoj de la Mortintoj » estis honormonumentoj al la forpasintaj homoj. Krome, ili staris en la tombejoj por rememorigi al la vivantaj preterpasantoj, ke la mortintoj nun estas lumigitaj de la heleco de la Kredo, kaj precipe ke la vivantoj devas memori pri la mortintoj kaj preĝi por ili.

Kvankam oni ne precize scias, kiu aŭ kiuj pagis la oleon por la daŭra lumigo de la lampoj, oni tamen scias, ke en kelkaj urboj estis specialaj tiucelaj donacoj, en aliaj urboj kaj vilaĝoj estis devigaj kaj laŭvicaj donacoj de oleo, fare de la diversaj familioj de ĉiuj vilaĝetoj. En kelkaj lokoj, la pastroj faris specialajn monkollektojn por povi aĉeti la bezonatan oleon, por ke senĉese brilu lumo en la supro de la monumento.

Nuntempe, oni ne plu eklumigas lampon en la supro de la « Lanternoj de la Mortintoj ». Tamen daŭras la pia kutimo omaĝi al la mortintoj per lumo aŭ flamo : kelkfoje oni konstruas novajn specialajn lumturojn, kiel oni faris super la « Ostarejo de Douaumont », en Francujo, por honori la soldatojn, kiuj mortis apud Verdun dum la unua mondmilito ; aŭ oni kopias malnovan romanikan « lanternon » — ekzemple sur la tombo de la verkisto Maurice Barrès — ; kelkfoje oni ĉiuvespere rebruligas senĉesan flamon : tiel estas en Parizo sub la Triumfarko super la tombo de la Nekonata Soldato de la mondmilito 1914-1918.

Verŝajne ĉiam la homoj omaĝos al la mortintoj per iom aŭ multe da lumo, simbolo de eterneco.

Louis CHASSERIAUD.